

Justinus Kerner,

## Nun estu trinkata

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Nun estu trinkata brilanta la vin'!  
Karuloj, mi devas forlasi nun vin.  
Adiaŭ vi montoj kaj patra vi dom',  
Pelata mi estas migrema mi hom'.

La suno ne restas sur lok' ĉe l' ĉiel',  
Ĝi iras antaŭen laŭ sia korpel'.  
La ondo ne restas soleca ĉe l' strand'.  
La ŝtormo bruadas potence tra l' land'.

Kun hasta nubaro la bird' flugas jen  
Kaj kantas enfore pri sia reven'.  
Peliĝas nun same la hom-junular',  
Por migri eksteren tra lando kaj mar'.

Salutas lin tie jen super la mar'  
El lia hejmlando veninta birdar';  
Odoras hejmece ĉirkaŭe de li,  
Peliĝas aere eĉ ĝis tie ĉi.

La birdoj rekonas la domon de li,  
La florojn li plantis pro am' tie ĉi.  
La amo, ĝi sekvas lin ja ĉie ĉi,  
Hejmeca fariĝas la foro por li.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken" de JUSTINUS KERNER (\*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014.*

*Arg-1030-2265 (2015-01-28 00:00:06)*